

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 31/10/2019 Kvarcentkvindeka eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajletero

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute **810,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **296,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **280,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **234,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.”. N.ro.92



P.A.G., uzas plurajn paĝojn por diskuti la uzon de la aŭ-adverboj. Ili estas: ankoraŭ; baldaŭ; hieraŭ; hodiaŭ; morgaŭ; adiaŭ; almenaŭ; ankaŭ; apenaŭ; kvazaŭ; preskaŭ; Jen la nefacilajn kazojn:

Mi venos baldaŭ; ne, mi venos plej baldaŭ; Ankaŭ ĉi tio estas vera; Tio ĉi ankaŭ estas vera (zamenhofaĵo evitinda, ĉar metu “ankaŭ” prefere antaŭ la ekstraĵo); Ŝi, sed ankaŭ ŝia edzo venos; Ni aktivas tiel por Esperatoj kiel por paco; Karolo ankoraŭ vivas; Mi ankoraŭ malsatas (preskaŭ samsenca al :”Mi malsatas plu); Ju pli mi lernas des pli mi sentas ke mi devas lerni ankoraŭ pli; Ĉiam ankoraŭ ŝi atendas; Krom tiu parko ekzistas ankoraŭ parketo apude; Li atendis ankoraŭ duan manĝaĵon (=”atendis ankoraŭ” =

“to expect” = “esperi”, prognozi”); Ŝi estas ankoraŭ pli pala ol hieraŭ (= “eĉ”); Li ploris ankoraŭ antaŭ ol punati; La glacio ne estas ankoraŭ sufiĉe dika (egalas al “ankoraŭ ne estas”); Li apenaŭ ridis (= Li preskaŭ ne ridis). (daŭrigota) **Marcel Leereveld.**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm ĝis 12 tagmezo, Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagota kafo atendas vin. La 2a de novembro estos la unua sabato. Venu



Roger Springer

Kiam oni atingas la "plenkreskaĝon"?

Sub la titolo "KAJ VIA AĜO?" Marcel prezentas proponon, en kiujn aĝgrupojn oni povas disdividi homojn.

Marcel montras engrupigon, kiun verŝajne multaj el ni simile uzas.

Leginte liajn vortojn, tamen mi memoras pri informo, kiun mi ricevis de diversaj fontoj:

La homa cerbo estas plenevoluita nur ĉirkaŭ la 25-a vivojaro.

Mi demandas min, kiun influon tiu scio devus havi je nia percepto, kiam oni estas plenkreskulo. (Legu: Kiam oni havu la rajtojn de plenkreskulo.)

Mi ne havas nekontesteblan respondon.

Amike,

Peter Weide



"La rajto de la ĉefministro sole deklari ĉu ni faru militon aŭ ne"

(kiel skribis Marcel Leereveld en AE449) vere estas abominaĵo treege danĝera. Supozeblas, ke tiu regulo ekzistas pro tio, ke se oni permesus diskutadon eblus prokrastado de la afero kiel okazas ĉe Brexit. Sed ĉu tia prokrasto kaj malrapida decido ne estus preferinda ol ke diktatoroj kiaj la plimulto de la nunaj mondaj ĉefoj kreu vundadon, murdon, detruigon, mensmalsanon kaj pliajn obscenajn katastrofojn? Kiel komenci diskuton kaj agadon por ŝanĝi tiun regulon en nia lando? Informiĝi, kompreni kaj plendi estas komenco. Espereble ontaj gejunuloj trovos solvon kaj malŝargos la problemon.

Vera Payne



Jarfine diversaj Eo-eventoj: inkluzive de Afriko.

Cele plentempe okazigi sian sepan Kongreson.

Afriko lanĉas alvokon por varbi partopenantojn el diversaj kontinentoj, por montri al neesperantistoj ke Esperanto estas vivanta lingvo kaj ke ĝi ne estas nur afero de kelkaj individuoj.

Bonvolu honori nin per via ĉeesto, en la plej apudlaga Tanjika urbo, Buĵumbura, la ekonomia ĉefurbo de Burundo.

Pluraj esperantistoj el najbaraj landoj aliĝis, kaj ni esperas ke vi ankaŭ ne maltrafos ĉi okazon kongresumi en Afriko, kun afrikanoj en vera afrika etoso.

Tamburado, folkloraj dancoj, instruado de lokaj kaj regionaj lingvoj, sporto... ĉio atendas vin en Buĵumbura.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Se vi interesiĝas, ne hezitu tuj aliĝi

al: <https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLScznM0-vVrEXaxiMBciQC2MNVsAvQioOqbUGMH2IZStPLR09Q/viewform>

Por helpi nin bonege organizi nian kongreson, ni petas al vi kontribui al ĝia programo.

Plenigu ĉi folmularon:

https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSeSz6taYo5gd1804M9AflI0IUL8J_hK7jIVrNvpjxmXaphN4Q/viewform?vc=0&c=0&w=1

Ni ankaŭ ŝatus havi kelkajn informojn, kiuj helpos al ni tre bone servi vin, por tiuj kiuj bezonos invitleteron, vi plenigu ĉi formularon:

https://docs.google.com/forms/d/1ZDI4fig-L4YeWVt2kLOI1Si09pUmp254DrahiOv-Utk/edit?usp=sharing_eip&ts=5daaecca

Bonvolu disvastigi la informojn al multaj esperantistoj por kovri la atenditan buĝeton. Konforme la ricevitan informon fare de la estrarano de UEA pri Afriko, Jérémie Sabayumvi, ĉeforganizanto de la Afrika Kongreso de UEA kunlabore kun la Afrika Komisiono de UEA, 5000€ jam kolektiĝis kaj mankas 3000€ por kovri la tutan buĝeton. La Afrika Kongreso de UEA ĉiam donas la ŝancon al afrikanoj, kiuj neniam povas vojaĝi eksterafriken por spertiĝi. Estas okazo por ili renkontiĝi, konatiĝi kaj debati pri afrika movado. Afrika Komisiono celas vojaĝigi aktivulojn el diversaj anguloj de Afriko. Por atingi tiun celon, ni petas bonvolontulojn subteni la okazigon de la Kongreso. Via mondonaco estas atendota ĉe "la Konto Afriko" ĉe UEA kun mencio 7a-AKE. Ni anticipe dankas ĉiujn kontribuantojn por la modesta gesto favore al Afriko.

La Kunordiganto de AK

François Hounsounou

La ĉeforganizanto de la 7-a AKE

SABIYUMVA Jérémie



El Ĉinujo

Karaj S-anoj, ja nia movado bezonas urĝe pli da junuloj, Elinjo kaj Petro el Bretonio, Francujo, nun turneas en Ĉinujo. Ili gvidas junulojn lernante ludi (aŭ ludante lernas), Esperanton. Tiujn vojaĝajn laborojn tre valoras.



Mi aldonas kelkajn fotojn pri ilies aktivado kun la lokaj s-anoj en Wuhan, Hubei, Ĉinujo. Bedaŭrinde raras junuloj ĉe ni...

Mi dezirus ĉion bonan al vi ! Via

Trigo/Lili

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gajnintoj kaj malgajnintoj en mia ĝardeno.

LA GENIO DE ZAMENHOF.

Mi ne scias, ĉu Zamenhof uzis, aŭ eĉ vidis, la vorton “kialo”, sed mi tre dubas. Sed li certe ne vidis aŭ uzis “tialo”n, kaj ne partoprenis en la rivaleco inter la donalda “kialo” kaj mia “tialo” nun en A.E. Tamen jam en sia tempo, do longe antaŭ ol Donald k. c. ankoraŭ “kialo”-umas, Zamenhof en siaj ekzemploj jam estis duonvoje al mia “tialo”. Li ja skribis i.a. du frazojn, en kiuj li uzis la vortojn “kial” kaj “tial” kiel substantivojn. Jen ili estas (vidu P.I.V.):



- 1) “Kiel do mi respondus al vi pri via “kial”?”. Ĉi tie “kial” ne estas la respondo, sed la demando, kaj “mia respondo” estus “mia “tial”, mia tialo. En ĉi tiu Zamenhof’ajo “mi respondus” eĉ povus esti “mi “tialus” = mi motivus.
- 2). “Ĉiu “tial” havas sian “kial”. Se la substantive uzataj adverboj “tial” kaj “kial” transformiĝus al veraj substantivoj, kiel en “labor”o > “laboro” kaj “baldaŭ”o > “baldaŭo”, la frazo fariĝus “Ĉiu “tialo” havas sian “kialon”, en kiu frazo “tialo” signifas “motivon” kaj “kialo” estas “demando”.

Do ne estas Zamenhof aŭ mi kiuj ŝanĝis la signifojn, sed Donald kaj liaj vortaroj.

La psiĥologia kaŭzo ke jam la eŭropaj lingvoj “kialo-umas” estas verŝajne, ke kiam oni petas ekscii kiu estas la motivo de ago, oni jam pensas pri la respondo, kiu ja estas la motivo. Do en sia demando oni jam uzas la vorton “kaŭzo aŭ motivo”, sen scii la enhavon de tiu “tialaĵo”. La “why” ja jam pensigas pri la specifeco de la “therefore”. Sed la “whyness” estas

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

nur la demando, *enquiry*, “kialo”, kaj nur la “*thereforeness*” (tialo) havas la specifan respondon. Se oni volas mencii nur la ĝeneralan kaŭzon aŭ motivon, oni povas uzi “la ialo”n, ekz. “La parlamento ne donas iujn ajn ialojn”.

Marcel Leereveld.

TIALO KAJ KIALO .

En la ekzamenado de Donald kaj mi por trovi la signifojn de “kialo” kaj de “tialo”, ni nun finis eltrovi tiujn signifojn se ni akceptas ke la vorto “kialo” kreas el la subjunkcio “kial”. La rezulto de tiu konkludo estas negativa, ĉar Donald persistas, helpate de S-ro Aldridge, ke ŝanĝante la adverbajn subjunkcion “kial” al substantivo “la kialo”, ĉi lasta ricevas la signifon de kaŭzo aŭ motivo. Donald ne menciis, ĉu tiel li ne plu kredas ke “la kialo” elvenis ankaŭ el la demanda adverbo “kial” kiel en “Kial li foriris frue?”, kiel aliaj Esperantistoj kredas. Mi kontraŭe persistas, ke se oni volas formi “La kialo”n el la Demanda Adverba Subjunkcio, kiel en “mi ne scias, kial li foriris frue”, tiukaze “kial” estas kaŝita demandvorto en “mi ne scias (= Mi demandas) “Kial li foriris frue?” kaj la substantivo de demanda vorto “kial?” signifas “demando”, ne la respondon “la tialo” el de “tial”, kaj do nur “la tialo” povas signifi “kaŭzo aŭ motivo”n. Se “kial” estas ne demanda sed Rilata Adverba Subjunkcio ĝi signifas sian antecedenton kiu estas “La demando” (kiel en ekz. “La demando kiun mi faras” kaj ree la substantivo estas “La demando”, kiu estas ne la respondo, kiel en “tial” kaj “La tialo”. Sed pri ĉi tiu mia klarigo pri “la kialo” en sia respondo Donald respondas nur ke mi malpravas ĉar “Marcel ŝanĝis la signifojn”, sen pruvoj kaj sen mencii kaj klarigi tiujn laŭ mi ne ekzistantajn ŝanĝojn.

Ni ekzamenis ankaŭ la ekzaktan signifon de la vorto “neologismo”. kaj mi konsentas kun Kalocsay, ke ĉiuj neoficialaj vortoj estas neologismoj kaj ke ĉiuj derivaĵoj de oficialaj radikoj inkluzive de la nudaj (kialo, ktp) estas oficialaj vortoj. Donald samopiniis, sed faras kelkajn esceptojn pri la “nudaj” vortoj. Tio koncernas ankaŭ vortojn kiaj “La kialo”. Mi preferas ne fari esceptojn en Esperanto.

Nun restas ekzameni, kion signifas “kialo” kaj “tialo” se ni derivas ilin de la simplaj Adverboj Demandaj “kial” kaj de “tial”. Donald komence menciis la opiniojn de la vortaraj kaj gramatikistoj, kaj komence plejparte samopiniis kun ili. Sed eble li ŝanĝis sian opinion pri kelkaj asertoj aŭ pri multaj asertoj. Se ne, mi atendas ke li klarige refutos miajn tezojn donitajn pri tio en n.ro 443. Se ne, mi konkludos ke li ne kapablas refuti ilin, sed ne ŝatas konfesi tion (tio okazis ankaŭ al aliaj kritikantoj miaj). Se jes, mi esperas ke li ne senpruve diros nur “Oh, Marcel malpravis ĉar li ŝanĝis la signifojn kaj vortojn”.

Marcel Leereveld.

KION FARI, KIAM ZAMENHOF FARIS ERARON ?

La plej multaj Esperantistoj aktivaj dividiĝas en du “skolojn”, en du partojn kun du malsamaj ideoj kiel Esperanto devos disvolviĝi en la estonteco. La unua grupo, bonŝance la plej malgranda, kredas ke Esperanto ne povas ne evolui same nature kiel la etnaj lingvoj, t.e. per ŝanĝoj farataj de la parolanta Esperanto-amaso. Krom kelkaj mezaj opiniantoj, la resto

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

kredas ke ĝia vortaro kaj ĝia gramatiko restu laŭ la Fundamento de Esperanto, kaj ke nur kelkaj vortoj akceptatu pri novaj teĥnikaĵoj kaj kulturaĵoj. En niaj diskutoj ni parolas nur pri la lasta, granda, grupo, ĉar per la unua grupo Esperanto malrapide sed certe fariĝos simile neutila kiel la etnai lingvoj por internacia interkomprenilo.

Novaj eraroj, kaj precipe novaj vortoj, estas certograde ekzamenataj de la A.d.E., kiu tamen montriĝis ne sufiĉe klera por la tasko. Do la laboron prizorgi la ĝustan gvidatan evoluon parte transprenis individuaj Esperantologoj, da kiuj tre kleraj nuntempe ne estas sufiĉe.

Unu el la problemoj plu diskutendaj estas, kion fari pri la eraroj, nur du aŭ tri seriozaj, kaj kelkaj malgrandaj, de Zamenhof. La lingvo uzata de Zamenhof estas, jen oficiale kaj jen kiel ekzemplo, grava parto de nia Fundamento. Estas nature, ke Zamenhof faris erarojn, sed ne multajn, kaj kelkajn li jam mem korektis. Liaj eraroj ĝenerale ne estas eraroj pro nekompetenteco, sed pro la fakto ke oni puŝis lin daŭre uzi eŭropajn vortojn kaj gramatikaĵojn. Kiel nun ŝanĝi la vortojn sen kompromiti la Fundamenton? Zamenhof mem konsilis, uzi la novan pli bonan vorton sed ne maloficialigante la malnovajn vortojn. Li faris tion mem, sed la Esperantistaro tre hezitas pri tio.

Pri la gramatiko li estis pli konservativa. Li sciis aŭ sentis, ke kelkaj liaj gramatikaj reguloj aŭ uzoj estis ne tre bonaj ĉar kopiitaj rekte el eŭropaj lingvoj. Ni plu uzas ilin. La nur du aŭ tri gravaj mallogikaĵoj estas lia Adjektiva Pasiva Voĉo kaj lia neklareco pri la Pasintaj Tempoj. Ni ne povas, ĉar ne volas, ŝanĝi ion ajn en la Fundamento, ĉar tio estus la fino de Esperanto. Sed, kiel Zamenhof mem konsilis, ni povas ĉesigi la uzadon de la malĝusta formo donita en la Fundamento kaj anstataŭe uzi pli ĝustan formon faritan ankaŭ laŭ Fundament'aj reguloj. Agante tiel ni ne maloficialigas la forlasitan formon sed ni uzas la novan pli ĝustan formon kreitan per la reguloj de la Fundamento. Ĝis nun la jenaj problemoj solvatis, sed ofte ankoraŭ ne uzatas vaste de la Esperantistaro.

1). La Pasiva Voĉo. Kiel Kalocsay, en unu el siaj lastaj kunvenoj de la Lingva Komitato, ekkriis senespere: "Esperanto ne havas Verban Pasivan Voĉon". Kaj li pravis. Sed intertempe, kvankam post lia morto, la afero solvatis per la deklaro, ke kiam la sufikso "-at-" uzatas kiel verbo, kaj nur tiam, la signifo de tiu sufikso, kaj nur de tiu sufikso, reduktiĝas de Pasiva kaj Nuntempa aŭ Nefinita al nur Pasiva, do Sentempa. Nun ni do posedas Verban Pasivan Voĉon, kiel en "La hundo batatis". Fakte, ĵus antaŭ la publikigo de Esperanto, Zamenhof jam enkorpiis similan Verban Pasivan Voĉon per speciala sufikso, sed pro eŭropa premo forlasis ĝin lastmomente.

2). La multsignifeco de la prepozicio "de". Tiu problemo solvatis similmaniere, per la Prepoziciaĵoj "ante al" kaj "ate de".

3). La malgrava eraro, kreita nur post Zamenhof, de la uzo de "kialo". Ankaŭ ĉi tiu eraro jam solvatis per la Fundament'eca kreo de la substantivo "tialo".

4). La erara uzo de la adverbo en la predikativo por indiki infinitivon aŭ subordan frazon kiel la Subjekton. Tio iomete solviĝis pro la permeso de Zamenhof, ke la adjektivo uzatu en kazoj de miskompreno.

5). La geografiaj nomoj. La sistemo uzata kaj rekomendata de la A.d.E. formas kvazaŭ apartan lingvon kun ne-Esperantaj reguloj. La lastaj Akademioj de Esperanto helpis krei ĉi

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

tiun anomalion, kaj eblaj korektoj estas apenaŭ aŭdataj aŭ uzataj, kaj sendube aspektigas nin al la mondo kiel grupon de amatoraĉoj.

Marcel Leereveld.



El Adelajdo

Kviza posttagmezo



La 26-an de oktobro Trevor Steele gastigis la lokajn esperantistojn, kiuj ŝatas kvizumi. Li preparis 50 (malfacilajn) demandojn kaj por helpi (ankaŭ por misgvidi ilin) li donis 3 eblajn respondojn. Ĉiu bone amuziĝis kaj iom eĉ lernis.

Katja Steele



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



Prezidanto de UEA venos al Aŭstralia-Novzelanda Kongreso!

Krom la jam-anoncitaj du eminentuloj (Stefan MacGill kaj Katalin Kováts), kiuj venos al la Esperanto-kongreso kaj somerkursaro en Aŭklando venontan januaron, la nova prezidanto de UEA, **Duncan Charters**, ĵus konfirmis sian partoprenon! Precize kiel li partoprenos estas ankoraŭ findecidota, tamen li estas spertulo pri lingvoj kaj kulturoj (fakte, li estas ĉefo de tiu universitata fako ĉe Principia College, Usono), do lia kontribuo certe estos valora. Li jam esprimis deziron prelegi pri temoj kiel “Kiel poliglotoj lernas lingvojn?” kaj “Kiel komuniki publike?” Se vi ne jam mendis lokon ĉe la kongreso, espereble tio helpos vin decidi jese.

Pli da informoj kaj reta mendilo haveblas ĉe

aea.esperanto.org.au/kongreso

Raportis **Jonathan Cooper**, vic-prezidanto de AEA



Duncan Charters



Pli pri la multkultura festivalo Maitland Riverlights

Mi scias, ke Alan Turvey jam sendis fotojn de Riverlights Festivalo Maitland por AE448, tamen mi decidis – iom malfrue – verki mallongan raporton kaj sendi pluajn fotojn.

Dum la posttagmezo kaj vespero de sabato, la 12-a de oktobro, kvar esperantistoj (Andrew Spannenberg, Alan Turvey, Joanne Cho kaj Jonathan Cooper) veturis al Maitland, NSK, por partopreni en la multkultura festivalo *Riverlights* de 2019. Kiel antaŭe, Andrew diligente laboris por starigi kovritan budon por la Esperanto-Federacio de NSK. Sur nia tablo estis pluraj aĵoj (kaj aĉetebaj kaj senpagaj) kaj ĉe ambaŭ flankoj, alta memstaranta afiŝo pri Esperanto kaj Esperanto-Domo. Pluraj homoj haltis kaj demandis pri kio estas Esperanto. Joanne estis aparte efika kiel propagandanto. Je 17:00, en la proksima “*Language Lounge*”, Jonathan instruis Esperanton al malgranda grupo da gejunuloj, uzante magnetajn radik-kahelojn, kiujn li kreis. Je 20:15, Joanne, Jonathan kaj lia edzino, Wanda, fiere piediris kun Esperanta flago en la granda parado al la riverbordo, kie ni spektis mirindan prezentadon sur kaj apud la rivero. Dum tiu spektaklo mallonge aperis lumbildo kun la vorto “Esperanto” kaj Esperanta flago antaŭ simpla mapo de Eŭropo (vidu foton en AE448). Ŝajnas, ke la kreintoj pensis, ke Esperanto estas eŭropa lando!



Interesulo parolas kun Alan



Jonathan kaj Wanda piediris en la granda parado.
Foto: Joanne Cho

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



Alan, Jonathan, Joanne kaj Andrew

Raportis **Jonathan Cooper**,

Kialo kaj Tialo; Respondo 3

Neologismo

En AE 449 Marcel mise prezentis tion, kion mi skribis pri la difino de Zamenhof pri *neologismo*. Zamenhof traktis proponitajn, nekongruajn difinojn de oficialaj vortoj kiel neologismojn, kaj aliajn novajn vortojn li nomis “novaj vortoj”. Tial li havis du kategoriojn. Esperantistoj rajtas proponi novajn vortojn, sed nur la Akademio de Esperanto rajtas oficialigi Zamenhof-tipajn neologismojn.

Kial

Marcel menciis la “malĝusto derivi la substantivon *kialo* el la subjunkcio”. Tiun opinion li menciis en pli frua artikolo, kaj mi jam refutis tion en AE 445. Marcel skribis: “*kial* signifas ekzakte *demando por ricevi la motivaĵon por iu ago*”. Li malpravas. Legu en PIV:

***kial**

1 Demanda morfemo, signifanta «el kia kaŭzo?», «el kia motivo?»: *kial vi ploras?*^Z; *kial vi ne dankas iomete vian edzinon?*^Z; *ni lasu ĝis morgaŭ.* — *kial morgaŭ?*^Z; *kial ne?*^Z; *kial do mia patro kaŝus antaŭ mi ĉi tion?*^Z; (preskaŭ ekkrie) *ho, kial mi ne restis en Jeruzalemo!*^Z.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

2 Samsignifa morfemo, enkondukanta dependan demandon: *li diris al mi, kial li tiam ne volis respondi; detale klarigi la motivojn, kial ni ĝin ne efektivigas^Z; la kaŭzo, kial^Z (pro kiu); jen kial mi venis.*

3 La sama, subst-e uzata: *ĉiu «tial» havas sian «kial»^Z; kiel do mi respondus al vi pri via «kial»^Z.*

kialo. Kaŭzo, motivo: *jen la kialo de ilia decido.*

Do kiel mi respondu al Marcel pri lia «kial»? Se li ne akceptas la fundamentan, en PIV troveblan, difinon de *kial*, ne utilas rezonadi plu pri la afero.

Marcel skribis (AE449): *Do “kial” estas (speciala) demando kaj ne indikas ke la respondo jam estas konata, nur ke ni atendas la respondon. Se tio estas la kazo, la substantivo “kialo” ne povas enhavi aŭ esti la motivo (aŭ la kaŭzo).*

Sed tio ne estas la kazo. Tial lia rezonado estas malĝusta. Ekzemple,

Mi diris al li, kial la gazono estis humida (fakto jam konata de mi): ĝi estis humida, ĉar la pluvo falis dum la nokto (jam konata fakto).

Mi ne volas enuigi la legantojn de ĉi tiu diskuto (se iuj legantoj restas nun) per ripetado de la refutaĵoj, kiujn mi jam prezentis en antaŭaj artikoloj. Kiuj interesiĝas pri la afero, tiuj povas relegi ilin.

Post tiuj refutaĵoj, Marcel proponis pluan argumenton (AE446) bazitan sur la neutila ekzemplo:

Mi ne venis TIAL (= laŭ tiu motivo)[,] KIAL (= laŭ kiu motivo) venis mia edzino”...

Fakte, oni preskaŭ neniam havus bonan okazon, uzi la korelativan paron *tial, kial*. Zamenhof ne uzis ĝin. Ĝi povas esti malklara kaj dubsenca, kion montras la pluraj, eraraj, ekzemploj troveblaj en la interreto, el kiuj mi citos du:

*Ni NE grandigu la malgrandojn *tial, kial* ili vivas en influa lando, *kial* ilia lingvo estas konata de la tuta mondo.*

<https://es-la.facebook.com/groups/esperanto.grupo/permalink/10155395311580289/>

**Tial, * kial universitataj studentoj el diversaj landoj decidas lerni fremdan lingvon[:] vojaĝi, renkonti novajn ulojn kaj kulturojn... profesiaj eblaj...*

<https://denaskuloj.home.blog/2019/05/28/kial-studentoj-decidas-lerni-fremdan-lingvon-sciencia-artikolo/>

La kutima kazo estas, ke oni uzas *kial* sole:

*Mi diris, **kial** mi agis tiel.*

En pli kompleksaj kazoj, aŭ por emfazo aŭ klareco, oni povas uzi la korelativan paron **tio(n), kial**:

*La modelo de Van Parijs celas klarigi ne tion, kiel la maksimumiga lingvo komence atingis tiun avantaĝon... sed nur **tion, kial** tiu tendenco postvivas historiajn faktorojn.*

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Beletra Almanako 21 (BA21 - Literaturo en Esperanto),
 edited by Jorge Camacho, Istvan Ertl, Probal Dasgupta, Tim Westov, p.123

Resumo

La plej simpla klarigo estas, ke

- la vorto *tial* (tiukaŭze, tiumotive, tiuintence) povas havi, kaj tre ofte havas, la sencon *rezulte, sekve* (angle, *therefore, consequently*), sed
- la vorto *kial* (kiukaŭze, kiumotive, kiuintence) neniam havas tiun sencon, sed ĉiam rilatas nur al la *kaŭzo, motivo, aŭ intenco* (angle, *why, wherefore, what...for*).

Tial (rezulte, sekve),

- la vorto **tialo** povas forte sugesti la *rezulton, la sekvon; dum*
- la vorto **kialo** klare rilatas al la *kaŭzo, motivo, intenco*.

Konkludo

Kiel eksperimento, mi provis, ĉu eblas konvinki Marcelon, per argumentoj, rezonado, kaj pruvoj, ke unu el liaj gramatikaj aŭ lingvaj ideoj pri Esperanto malpravas. Mi trovis, ke kiam mi malpruvis iun lian argumentan punkton, li plejparte ignoris tion, kaj poste uzis diferencajn argumentojn.

Mi ankaŭ volis vidi, ĉu Marcel povas pravigi sian proponon per rezonado laŭ la Fundamento. Li ne povas.

Ni ambaŭ ne sukcesis konvinki la alian pri ĉi tiu lingva problemo. Ne utilas daŭrigi la diskuton. Ni daŭre malkonsentos.

Tial, mi dankas al Marcelo pro liaj ĝentilaj kontribuoj, kaj lasas al aliaj legantoj relegi la debaton kaj mem decidi, se tion ili volas.

Dankon

Mi dankas al Vilhelmo Aldridge, pro liaj helpaj komentoj.

Donald Rogers



3zzz En la elsendo de la 28a de oktobro inter liaj eroj Przemyslaw Wierzbowski prezentas la 93an SATkongreson en Bjalistoko kaj UEA invitas debati pri Unuiĝintaj Nacioj kadre de la UK en Montrealo
 Franciska Toubale


Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Nova infanlibro en Esperanto

Karaj,

Eblas nun antaŭmendi la Esperanto-version de la tre ŝatata infanlibro de Julia Donaldson "The gruffalo". La titolo en Esperanto estas "La krubalo". Ĝi kostas nur 5 britajn pundojn. Vidu

<https://esperanto.org.uk/store/product/101-la-krubalo-the-gruffalo-in-esperanto/?tab=shipping>




Amike, **Nicole Else**

El Brizbano

Informis

Peter Danzer

Baha'anoj el la tuta mondo celebras la ducentan datrevenon de la naskiĝtago de La Bâb. La foto montras en la mezo Diano Lukes kaj Sandra Connors post la Selenaĵoj en Tuvumba. Ankaŭ ĉeestis Petro kaj Linda Danzer. Foto 2, Sandra kaj Linda (kiu kantis en la programo)



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE